

Lân
fan
taal

la
verda
stelo

BESYKJE OM
ELKOKAR TE
FRUOTEN.
SETZT ALLES
DARAN, UM
ANDERE NOCH
BESSER ZU
VERSTEHEN.
BONVOLU
KOMPRENI UNU
LA ALIAN.

dat ti kan fersmaak warden, bakkere se alles te
kalkuleti dat wat dytjen hat. Dit is dregti di
dat dit alles. Omme te warden de warden di te
in dit de warden te warden, di kan dit te warden
te warden warden. Mar dit wat dit dit
dit dit dit dit dit dit dit dit dit dit dit dit dit dit
dit dit dit

Au je voudrais bien parler, parler je suis
je voudrais bien parler, parler je suis
je voudrais bien parler, parler je suis
je voudrais bien parler, parler je suis
je voudrais bien parler, parler je suis
je voudrais bien parler, parler je suis
je voudrais bien parler, parler je suis
je voudrais bien parler, parler je suis
je voudrais bien parler, parler je suis
je voudrais bien parler, parler je suis

If you want to understand someone, try to really
listen to what they are saying. It can be harder
than it seems. Sometimes the words used can
hide the real message. Ask your partners and
ask others what you hear. But if you really do
your best, you can be surprised by what the
other person wants to say.

SEKCIO
ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

oktobro 2018



LA VERDA STELO

eldono de

**ESPERANTO
NOORD-NEDERLAND
ESPERANTO-KLUBO
POR LA PROVINCOJ
GRONINGEN, FRIESLAND KAJ
DRENTHE**

prezidantino

s-ino I. Emmelkamp
Arubastraat 12
NL-9715 RW Groningen
Tel: +31(0)505 718 842
info@esperanto-info.nl

provizora sekretariejo

s-ino I. Emmelkamp
Arubastraat 12
NL-9715 RW Groningen
Tel: +31(0)505 718 842
info@esperanto-info.nl

kasisto

s-ro R. Hofman
Castorstraat 360
NL-9742 BZ Groningen
Tel: +31(0)6 42247155
esperanto@ziggo.nl

kontaktuloj Frislando

s-ro W. Akkerman
Westerein 41a
NL-8571 GB Harich (Frl)
Tel: +3151 460 22 72
wiebren.olaf@gmail.com

kaj

s-ro A. Hovinga
De Fennen 47
NL-8918 CC Leeuwarden
Tel: +31(0)628 916 262
andries.hovinga@tiscali.nl

Esperanto-centro

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
NL-9728 MC Groningen
Tel: +31(0)505274572
info@esperanto-info.nl

redakcio

I. Emmelkamp, R. Hofman A. Hovinga
la.verda.stelo@xs4all.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

Enhavo

Agendo	3
Naskiĝtagoj	4
Peter van der Velde	5
Vintro sur la Pejzer-kampar'	7
Aŭtuno	8
Mia avo	9
Lân fan taal	10
Kial?	11
Enigmo	11
Gabrovo	12
Recepto	12
Pri la nordo	14
Nekrologo	15

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2018

Afdelingslid (incl. abonement La Verda Stelo)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonement La Verda Stelo	€ 7,00

Over te maken op IBAN: **NL50 INGB 0003 8224 72** t.n.v.

Esperanto Noord-Nederland te Groningen

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **Esperanto Nederland**.

Vandaar dat wij hier ook het IBAN ervan vermelden:
NL10 TRIO 0786 8441 67 t.n.v. Esperanto Nederland te
Capelle aan de IJssel.

Lidmaatschap (incl. abonement Fenikso)	€ 35,00
Gezinslid	€ 12,50

Kunvenejo: Dreesflat, W. Dreesstraat 1, Groningen

- ŝanĝoj rezervitaj -

La plej freŝajn novaĵojn kaj ŝanĝojn vi trovos en nia retejo:

<http://pingveno.nl/klubo>, sub la rubriko **Aktuale**

novembro

- | | | |
|----|-------|-----------------|
| 1 | 19:45 | Distra parolado |
| 15 | 19:45 | Distra parolado |
| 29 | 19:45 | Distra parolado |

decembro

- | | | |
|----|-------|----------------|
| 15 | 13:00 | Zamenhof-festo |
|----|-------|----------------|


Naskiĝtagoj

4 januaro	Wil	van Ganswijk-Vlasblom
27 januaro	Ineke	Emmelkamp
8 februaro	Andries	Hovinga
11 februaro	Henk	van Kappen
28 februaro	Luit	Staghouwer
24 marto	Bert	Begeman
1 aprilo	Tiny	Bulk-Beenen
6 aprilo	Petra	van Kappen-van der Kamp
7 aprilo	Ankie	van der Meer
10 aprilo	Smaranda	Tintu
5 majo	Gonda	Kruijjer
7 majo	Gerard	Boer
23 majo	Frans	Schild
27 majo	Warner	Renken
24 junio	S-ro	Snoek
10 aŭgusto	Nelly	Kiel
16 aŭgusto	Koos	Scharroo
27 aŭgusto	Hylke	Bron
30 aŭgusto	Johan	Swenker
3 septembro	Wiebren	Akkerman
6 septembro	Anna	Bijl-Bonder
7 septembro	Marita	Kruijswijk
17 septembro	Henny	van Hogen-Cornelissen
24 septembro	Els	van der Heij-Alblas
2 oktobro	Fien	Koopmans-Hollenga
14 novembro	Greta	Volders
1 decembro	Richard	Hofman



Peter vd Velde

Peter van der Velde
1918 - 2004
Esperantist



Het is in 2018 honderd jaar geleden dat Peter van der Velde werd geboren. Dit was voor de bibliotheek in Roden de aanleiding om een “Peter van der Velde-jaar” te organiseren.

Peter van der Velde was al jong lid van een socialistische jeugdvereniging, waarschijnlijk van de toenmalige SDAP. Op de Rijkskweekscholen was ook sprake van een socialistische stroming, wat in een lange traditie paste en waarin zijn studie Esperanto naadloos paste.

In mei 1937 heeft Peter de diploma's A en B (onderwijsbevoegdheid) Esperanto gehaald, en in 1965 de akte Esperanto L.O. Hij heeft meer dan 50 jaar gecorrespondeerd in het Esperanto





met Rikard Olsen, een drukker uit Hinnerup (Jutland, Denemarken). Hij gaf na de Tweede Wereldoorlog cursussen in deze kunsttaal. Veel leerlingen van de lagere scholen in Roden en Roderwolde heeft hij (altijd na schooltijd) de beginselen van de taal bijgebracht.

De vereniging Esperanto Noord-Nederland heeft een aantal van zijn gedichten uit de bundel 'Wilwaark' vertaald in het Esperanto. De vertaler is Luit Staghouver en enkele andere leden van de vereniging. Enkele gedichten werden voorgedragen door Ineke Emmelkamp op zaterdag 3

februari 2018 tijdens de openingsmiddag van het Peter van der Veldejaar.

Na de bijeenkomst heeft Ineke een brochure samengesteld, waarin de originele gedichten met de vertaling in het Esperanto zijn opgenomen. Deze brochure is overhandigd aan de bibliotheek en aan mevrouw van der Velde, die mij beantwoordde met een briefje in het Esperanto! In het tijdschrift van de historische vereniging 'Roon' (jaargang 39, nummer 3, februari 2018) is een lang artikel verschenen met als titel 'Peter van der Velde als Esperantist'. In de bibliotheek van Roden is een tafel en vitrine ingericht met diverse foto's en ook een Esperanto-diploma.

Naar aanleiding van dit jaar werd de Esperanto-club Noord-Nederland gevraagd om een kennismakingsles te organiseren in de lagere school in het dorpje Roderwolde. Ineke heeft deze taak op zich genomen en heeft op een ochtend verteld over Esperanto en een korte proefles Esperanto gegeven aan de kinderen van de hoogste klassen van de basisschool.

Ineke Emmelkamp

Vintro sur la Pejzer-kampar'

La kampoj kuŝas kviete kaj blank' frostiĝinte
La ŝafoj malvarmegas antaŭe je la latbaril'
En Urb' staras la Martinituro
Muzikludilo, kiu supren sin etendas

La kanalo estas glacikovrita kaj ventŝirmita de
La brunaj kanoj laŭlonge de la dig'
Aŭdeblas mallaŭte la plendhurlado
De ruĝaksela turdo senespera

Subombro de nigraj korvoj
Kiuj flugas al sia tranoktejo fora
Kaj poneoj, malvarmaj, kiuj ambaŭ kune
Proksime je la rustiĝinta kradbarilo staras

La vintrosezono blovas tra miaj vestoj
Kiam mi tramalvarmiĝinte iras hejmen
Kiu volas vivi tiu lernu suferi
Kiam vintras sur la Pejzer-kampar'

(Urb' = la urbo Groningen)

Aŭtuno

lom da koloro morte pendas ankoraŭ sur la ruĝaj rozoj
La somero tro rapide al sia fino venis
Pluvero helege pendas ankoraŭ sur la aŭtunaj kolĉikoj
Kiu treme kaj frostiginte en la malgranda korto staras

Tamen ankoraŭ brilas la suno kaj sekigas la brunajn foliojn
De fago kaj kverko, kiuj algluiĝas al nia vojo
La somero ŝajne perdis la lastan esperon
Kaj forigis ĉion kion ĝi iam posedis

Ĉu ankaŭ mi forigu ĉiujn miajn posedaĵojn
Ĉu mi ankoraŭ fojon vidos la florojn kaj la sunon?
Ĉu mi ankoraŭ fojon aŭdos kanti la gajajn birdojn
Ĉu venontan majon min ankoraŭ fojon atendos komenco nova?

Mia avo

Mia avo, ĉiam kampulservisto estis
De groningena agrokulturejo
Riĉega estis la kampulestro de la avo mia
Sed mia avo malriĉa suferis pro reŭmatismo
Ĉar mia avo, tra la argilo rampis.

Mia avo, ĉiam kampulservisto estis
Mia avo nenium tagon libertempis
Mia avo, kiu nenion de la mondo vidis
Nur la argilbulojn kaj fiherbojn vidis li
Ĉar mia avo, tra la argilo rampis.

Mia avo, ĉiam kampulservisto estis
Interŝanĝe de terpomoj, iom da kaĉo kaj paneroj
Miaj avo kaj avino vivis mallukse
Por pli agrabla vivo al ili mono mankis
Ĉar mia avo, tra la argilo rampis

La kampulestra filo, nun sencele rondveturas
En aŭto tute nova
Kaj fumas cigarojn po sesdek cendoj
De la ĉagren' kaj feliĉo de mia avo
Kaj mia avo, pace kuŝas en la argilo.



Lân fan taal

Festi sian lingvon en libera ŝtato.

Tio estas la elirpunkto de 'Lân fan taal' (Lando de lingvo). Vivigi lingvojn, ludi per lingvoj kaj paroli en ili. Dum la tuta somero prezentiĝas en la MeM-pavilono tridek lingvaj komunumoj. Ankaŭ Esperanto.

Dum 7 tagoj ni prizorgis informbudon pri Esperanto. Sub la titolo: Tio kion vi de longe volis demandi pri Esperanto... Ni organizis tri sukcesajn koncertojn. Esperantistoj kaj ne-esperantistoj aŭskultis la muzikon de Kajto-kvaropo, Radio Esperanto kaj de Jonny M.

En la mateno de du sabatoj okazis rekta elsendo de Omrop Fryslân. En la unua estis intervjuo kun Ankie, Nanne kaj Andries. Ankie kaj Nanne donis prezentadon. En la dua sabato estis intervjuo kun Yves, Marc kaj Jonny M, kiu lasta donis prezentadon.

En sabato okazis diversaj prelegoj:



Ward de Kock prelegis pri la frisa esperantisto Wijtze Nutters. Marc Konijnenberg rakontis pri siaj spertoj dum la staĝo en Bialystok. Said Baluĉi prelegis pri: 'Kial Esperanto aparte gravas por aziaj intelektuloj?' Katalin Kovacs donis provlecionon. Anoj de Nederlanda Esperanto-Junularo plenis per prelego la lastan horon.

Jonny M (Germanio) donis bonan koncerton. Multaj junuloj ekdancis. Kaj ne nur esperantistoj!

Dimanĉon ni invitis ĉiujn partopreni interesan urban promenon kun esperantlingva ĉiĉerono. Tra la mondo per Esperanto: ĉiuj vizitantoj en MeM povis aŭskulti la avantaĝojn pri uzado de Esperanto dum vojaĝoj.

Kun-Kant-Kanonado kun Kajto. Ĉiuj, kiuj ŝatas kanti, povis kunkanti. Kantante ni transdonis la bastoneton al la rusoj.

Organizantoj estis Andries kaj Ineke, sed multaj helpis: Yves, Ingvo, Piet, Bert, Katalin, Dmitri, Korine, la prelegantoj kaj la muzikistoj. Estis por ĉiuj tre sukcesa semajno.

Ineke Emmelkamp

www.esperanto-nederland.nl

<https://lanfantaal.nl/>

Kial?

Ekde la komenco de la Esperanto-movado esperantistoj renkontiĝas por paroli la lingvon. Post pli ol cent jaroj ne multe ŝanĝiĝis. Nur multe pli malgranda dum kunvenoj nuntempe estas la ĉeestantaro. Junaj esperantistoj uzas modernajn metodojn por komunikiĝi inter si.

Ĉu asocioj estas ankoraŭ necesaj?

La respondo estas tute jes!

Kial do, se novaj esperantistoj preferas uzi Interreton por komunikiĝi?

Ĉi tiu numero de LVS temas plejparte pri Peter van der Velden. Kio okazis?

En la lasta jaro la biblioteko de Roden kontaktis nian asocion kaj petis de ni traduki kelkajn poemojn de Peter van der Velden. Se ne estus asocio, oni ne povus kontakti nin. Tiam ne estus traduktaj poemoj, kaj la 80(!) ĉeestantoj ĉe la malfermo de Peter van der Velden-jaro en la biblioteko ne aŭdus pri Esperanto. La malfermo de Peter van der Velden-jaro estis en la komunumo Noordenveld granda novaĵo kompreneble, kaj do komunikis pri tio kaj pri Esperanto la Roder Journaal kaj la revuo de la historia asocio Roon.

Aliaj organizoj, inkluzive amas-komunikiloj, scias trovi nin. Tial en la aŭtuno Johan estis aŭdebla je Radio Eemsmond pri Esperanto. Ankaŭ en Leeuwarden, kultura ĉefurbo de Eŭropo, ni ĉeestis multnombre. Ĉio ĉi certigas, ke multaj homoj aŭdas

pri Esperanto, kaj eble kelkaj el ili entuziasmiĝos kaj volos lerni la lingvon.

Tiel vi povus konkludi, ke aktiva asocio estas grava. Kaj aktiva asocio bezonas membrojn. Se vi do estas esperantisto, sed ankoraŭ ne membro de asocio, ne hezitu kaj aliĝu al loka Esperanto-klubo.

Enigmo

Semajno de enigmoj

La unua gazeto de enigmoj en Esperanto!

Ĝi enhavas krucvortenigmojn klasikajn, kriptajn kaj silabajn, vortoserĉojn, rebusojn, aliajn vortopuzlojn, novaĵojn kaj ceteraĵojn.

Ĉefredaktoro estas Giorgio

Denti, kiu estas ankaŭ prezidanto de la Roma Esperanto-Grupo.

Abono estas senpaga. Aktualaj numeroj estas dissendataj retroŝte al la abonantoj.

Detalojn vi trovos en la retejo:

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

KRUCVORTENIGMOJ

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)
1. Sevete, pikilo; 6. ____ tagono!; 7. Komentaĵo; C; 9. Estas bemaolo aŭ dieco (aluzitaŭro); 11 de sekaŭ anno, fekundeco kaj multo.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)
1. Subskribi, monofeni; 2. Legaron, cifron; Unuaginta Nacio; 4. Bonan ____!; 5. En la nimfo el Troado, ilino de rivera dio Keb por tianto je kerno.

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)
1. Blua vorto krom unu aliaj silaboj; (uzataĵo); 11. Ŝaka ŝaka; 12. 50 enigmoj el la kroma libro; 13. (uzataĵo) sur komputera asocio; Lenga lingvo de Esperanto; 14. Dikulo ankoraŭ; 15. Dico; 16. Tero; 17. Tero; 18. Tero; 19. Tero; 20. Tero; 21. Tero; 22. Tero; 23. Tero; 24. Tero; 25. Tero.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)
1. Duobla vorto krom unu aliaj silaboj; 2. Rilato al Peranto; 3. Simbolo por unu el sereno; 4. Rilato al Peranto; 5. Rilato al Peranto; 6. Rilato al Peranto; 7. Rilato al Peranto; 8. Rilato al Peranto; 9. Rilato al Peranto; 10. Rilato al Peranto; 11. Rilato al Peranto; 12. Rilato al Peranto; 13. Rilato al Peranto; 14. Rilato al Peranto; 15. Rilato al Peranto; 16. Rilato al Peranto; 17. Rilato al Peranto; 18. Rilato al Peranto; 19. Rilato al Peranto; 20. Rilato al Peranto; 21. Rilato al Peranto; 22. Rilato al Peranto; 23. Rilato al Peranto; 24. Rilato al Peranto; 25. Rilato al Peranto.

Recepto

Kremo de la Aa



Je la Zamenhof-festo Wil kunportis sian faman Kremon de la Aa. Ankaŭ vi nun povas baki ĝin.

Ingrediencoj:

- ½ litro da lakto
- 4 kuleroj da kustardopulvoro
- 250 g da butero
- 2 tasoj da sukero
- 5 kuleroj da rumo
- 1 skatolo da konfititaj ĉerizoj (bigarreaus)
- 2 malgrandaj aŭ 1 granda (spongo)kuko
- rabotitaj amandoj aŭ hakitaj nuksoj
- pulvorigita sukero

Preparo:

Varmigu la lakton kaj aldonu la kustardopulvoron por fari dikan kustardon.

Malvarmetigu ĝin en kuvo per malvarma akvo. Por preventi ŝeton restu kirlanta ĝis la kustardo estas malvarma.

Miksu la buteron kun la sukero ĝis kremo. Aldonu post tio la kustardon iom post iom tra la kremo.

Tranĉu la konfititajn ĉerizojn en malgrandajn pecojn kaj aldonu ilin kune kun la rumo en la kustardomiksaĵon.

Tranĉu la kukon en maldikajn tranĉaĵojn kaj kovru per ili la internan flankon de ronda kuvo. Plenu la kuvon per tavolo da kremo, poste kuko, denove kremo kaj laste per kuko. Konservu iom de la kremo.

Tenu la torton unu nokton en la fridujo.

Renversu la kuvon sur platan pladon kaj ŝmiru la torton per la restaĵo de la kremo. Dekoraci la torton per rabotitaj amandoj aŭ hakitaj nuksoj kaj sukerumi ĝin.

Gabrovo

El letero, kiun Wil ricevis de Esperanto-amiko en Gabrovo, Bulgario.

Ĝis la 1944-a jaro, kiam la Sovetunio okupis nian landon kaj ŝanĝis la demokratan registaron per komunista registaro kaj starigis la plej sangantan reĝimon kaj diktaturon,

kiun la homaro konas, nia urbo Gabrovo estis malgranda provinca urbo kun 25.000 - 30.000 loĝantoj.

Ĝi estas pitoreske situita sur la du bordoj de la rivero Jantra en la arbardensejo de la montaro Balkano. Ĝi estis vere eŭropa urbo kun pavimitaj stratoj kaj belegaj du- kaj trietaĝaj loĝejoj en la centro. En la flankaj stratoj, la pli granda parto de la loĝejoj estis belegaj unu-etaĝaj loĝejoj kun belaj bariloj kaj floraj ĝardenoj. La homoj vivis trankvile kaj feliĉe. La interna kaj la eksterna komerco prosperis kaj portis bonajn enspezojn. La ŝtato estis riĉa kaj la homoj kontentaj.

La urbo estis la plej granda industria centro en Bulgario. Plej grandan evoluon ricevis la teksuma industrio, pro kio la urbo estis nomita 'Bulgara Manĉester'. Poste sekvis ledproduktada industrio, la maŝina industrio ktp., en kiuj laboris la pli granda parto de la homoj. Ili estis kontentaj kaj bonstataj. En la urbo troviĝas la plej malnova gimnazio en Bulgario, konstruita en la jaro 1835 per donaco de la riĉa gabrovano Vasil Aprilov, kies nomon ĝi havas. Nun ĝi estas perfekta nacia gimnazio. En ĝi troviĝas ankaŭ la muzeo de la klerigo. Antaŭ 70 jaroj mi vizitadis la saman gimnazion. Nun lernas tie mia nepo Ivan. En la nuna jaro li finos (estos abituriento) kaj daŭrigos la studadon en la universitato. Li ĉiam ankoraŭ ne volas diri kion li studos:

medicinon aŭ informadikon.

La urbo havas Teknikan Universitaton, teknikan gimnazion, Domon de la Kulturo, Domon de la Humuro kaj Satiro, Teatron, tri ortodoksajn preĝejojn, tri konstruaĵojn, kiuj estas poliklinikoj, grandan malsanulejon, tuberkulozan malsanulejon, kiuj estas donaco de gabrova fabrikisto, kiu estis granda nobelo. Estas du ludplacoj, kovrita stadiono kaj ankoraŭ multaj aĵoj por amuziĝi. En la ĉirkaŭaĵo de la urbo estas bela ortodoksa monaĥejo kaj montaraj ripozdomoj, kien la gabrovanoj promenas kaj kie ili ripozas dum la ripoztagoj meze de la belega naturo. Kiam en la landon venis la komunistoj ekestis granda ĥaoso. Ankoraŭ en la unuaj tagoj, sen juĝejo kaj verdikto, ili ekstermis multajn homojn. La popolo ektimis. Ili naciigis la fabrikojn kaj la loĝejojn de la fabriklaboristoj. Oni detruis la malgrandajn kaj belajn loĝejoj, kaj tie konstruis grandegajn loĝblokojn, kaj tien transloĝigis nin por kontroli nin pli facile. En ĉiu enirejo de



tiuj grandegaj blokoj oni metis "Domestro"-n, kiu kutime estis membro de la Komunista Partio, kio sugestis respekton al ni, sed ni sciis, ke li observas nin kaj raportas al la Partio ĉion pri nia vivmaniero. Pro tio vi vidas en nia strato tiujn altajn loĝblokojn, kiuj ĉiuj havas lifton, sed la liftoj jam estas tre malnovaj kaj danĝeraj. Ni ne havas sufiĉe da mono por ŝanĝi nian lifton. Ni loĝas en la tria etaĝo kaj devas uzi lifton, ĉar ni tre malfacile piediras. Tre maltrankvile oni loĝas en tiuj loĝblokoj en kiuj estas grupigitaj homoj kun diversaj karakteroj kaj interesoj. Feliĉe ni troviĝas meze de tre bonaj najbaroj.

Germanio. Duonfoje ili pasis la vilaĝon Finsterwolde, kie ili paŭzis ĉe Greta. Mi rapide biciklis hejmen kaj la posttagmezon mi sidis ĉe la kompitilo kun Andries por finpretigi la programon por la Esperanto-semajno en Leeuwarden. Varmega la temperaturo ekstera, varma en la ĉambro. Kun akvo kaj glaciaĵoj ni travivis tiun tagon.

Ineke



Francaj Gastoj

En julio du francaj gastoj vizitis min. Ili trovis mian adreson en la broŝuro Pasporta Servo. Ili emas bicikli kaj estas membroj de BEMI. Ili alvenis la 25an de julio. La somera kafumado okazis la 26an de julio. Bernard, Murielle kaj mi biciklis al la Schimmelpenninckhuis. Agrabla matena kafo sub granda sunumbrello! Arjen-Sjoerd el Amsterdamo ankaŭ venis! Post la kafo (kaj la biero por la francoj) mi gvidis la gastojn al la urb- limo. Ili daŭrigis la vojon al



Nekrologo

Bets Dodebier

La 9-an de aŭgusto forpasis je la aĝo de 86 jaroj Bets Dodebier. Dum multaj jaroj ŝi estis membrino de la Groningena Esperanto klubo kaj de Esperanto Nederland. Ŝi tre bedaŭris ke en la lastaj jaroj ŝi ne plu povis partopreni la vesperajn klubkunvenojn.

Ege ŝi interesiĝis pri la aktivaĵoj de nia klubo. Speciale la subteno de Joseph, esperantisto el Kongo, korespondamiko de Luit, havis ŝiajn varman atenton kaj apogon. Ŝi iam vizitis Murmansk kaj kontaktis tie kun Esperantistoj, same kiel en la nordo de Polando. Ŝi ĉeestis en kelkaj Esperanto-kongresoj en- kaj eksterlande.

Ĉar ni estis preskaŭ samaĝaj kaj amikinoj ni regule faris kune ekskurson. Ni vizitis i.a. la Germanajn insulojn Borkum kaj Helgoland. La plej interesa vojaĝo kune estis ŝipveturo laŭlonge la marbordo de Norvegio ekde Bergen ĝis Kirkenes kaj returne kun multe da ekskursoj dumvoje. Bets estis dum multaj jaroj flegistino en kaj ekster Nederlando. Je la fino de tiu periodo ŝi estris la flegejon 'Innersdijk' en Groningen.

Ŝi loĝis en Zuidlaren, sed la lastajn tagojn de sia vivo Bets estis en la



flegejo 'Anholt' en Assen kaj tie venis fino al ŝia vivo. Laŭdeziro de Bets ŝi estis kremaciata en malgranda familia rondo. Multaj varmaj agrablaj rememoroj pri ŝi restas.

Wil van Ganswijk-Vlasblom.



AFZENDER / SENDINTO:

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

Castorstraat 360

9742 BZ Groningen



ESPERANTO - taal zonder grenzen